

Tiel ni markas la 75an naskiĝjaron de Svisa Esperanto-Societo, parto 6a
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 757, 1978.04.12 & 14 & 15

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Dum prelegaro ni prezentos al vi historieton de la esperanto-movado en Svislando helpe de tekstoj, kiujn ni ĉerpos el la revuo Svisa Espero. Tiel ni markas la 75-an naskiĝjaron de Svisa Esperanto-Societo.

A.- La duobla numero de septembro-oktobro 1906 de Svisa Espero aperigis tre detalan raporton pri la 2-a Universala Kongreso de Esperantistoj, kiu ĵus okazis en Ĝenevo de la 28-a de aŭgusto ĝis la 6-a de septembro.

Cl.- En enkonduka artikolo la Komitato de Svisa Esperanto-Societo tute prave instigis ĉiujn esperantistojn konservi en la memoro la nomojn de la kuraĝuloj, kiuj organizis tiun sukcesan kongreson, kiu grupigis por la unua fojo en la historio de Esperanto pli ol 1200 kongresanojn.

A.- Ni hodiaŭ rememorigos la nomojn de tiuj organizantoj, citante erojn el tiu enkonduka artikolo. Ni citas:

Cl.- «Tiu sukceso - de la Universala Kongreso - tute plene, pri kiu kelkfoje antaŭ kelkaj monatoj ni iom dubis, montras al ni kion povas homa energio, sindonema entuziasma penado kaj amika interkonsento, ecoj kiuj nepre ne mankis al la Loka Organiza Komitato kaj tre certe dum la tuta vivo ĝiaj anoj rememoros kun ĝojo kaj fiereco la utilajn horojn kiujn ili kune pasigis, preparante niajn festojn.

A.- Ni esperas ke la tuta Esperantistaro konservos en memoro iliajn nomojn, nomojn de personoj kiuj oferis malavare, senkalkule multe da tempo, da klopodoj, da fortoj al la Esperanta afero.»

Cl.- Kaj nun tiu enkonduka artikolo priskribas la laboron de tiuj homoj. Ni ree citas:

A.- «S-ro Edouard Bernard, la prezidanto, akceptis la entreprenon en tre malfacilaj kondiĉoj kaj direktis lerte la tre premantan laboradon. Li faris multajn vizitojn al oficialaj personoj. Li skribis grandan kvanton da leteroj, kaj tiu laborado, konstanta pripensado, okupis lin dum longaj monatoj. Li disdonis ĝustatempe specialan precizan taskon al la komisiistaroj, rezervante al si dum la kongreso ĝeneralan prizorgon kaj respondeblecon, kio ne estis la plej amuziga devo.»

Cl.- Laŭ adresaro, kiun publikigis Svisa Espero en decembro 1906, ni estas informataj, ke sinjoro Edouard Bernard estis juristo. La enkonduka artikolo poste parolas pri la kunlaborantoj de tiu kapabla prezidanto. Ni citas:

A.- «S-ro Edmond Privat la nelacigebla sekretario, kies nomo jam antaŭ la kongreso estis bone konata en Esperantujo. Li ĉeestis antaŭan jaron en la Boulogne-aj festoj kaj montris la lecionojn, kiujn oni povis eltiri el la neforgesebla kongreso. Li varmigis la komitaton per juna entuziasmo, al li ni ŝuldas ne nur la sukceson de l'Kongreso sed ankaŭ la Ĝenevan Kongreson mem; dum la Kongreso li estis ĉiam kaj ĉie kie la kongresanoj bezonis sciigojn aŭ informojn pri ĉiaj ajn aferoj.

Cl.- S-ro Lamon havis taskon gravegan: sin okupi pri la loĝado. Kiam oni pensas, ke alvenis al Ĝenevo por la festoj Esperantaj ĉirkaŭ milo da samideanoj, oni komprenas kiom li penadis

por kontentigi la fremdajn samideanojn, kies postuloj plej diversaj alkuris al la Loka Organiza Komitato. Dum monatoj li esploris Ĝenevon vizitante ĉiujn hotelojn, kolektante proponojn de loĝejoj, diskutante pri la kosto.

A.- S-roj Dubois, patro kaj filo, la Stelanoj, kiuj okupis sin pri la ornamo de ĉiuj kunsidaj ĉambroj, pensis pri folioj kaj floroj, pri Esperantaj standardoj, pri kokardoj; ili zorgis koran kaj facilan akcepton en la stacidomo por enkonduki tra Ĝenevo la alvenantajn samideanojn kaj aranĝis diskretan kontrolon por la eniro en la kunsidoj, necesa devo, kiun ili plenumis je ĝenerala kontentiĝo.

Cl.- S-ro Jira, la kasisto havis la plej timigan rolon, kiun ĉiu rifuzis antaŭe pro la terura respondeco, kiun ĝi kunportis, rolon kiun malgraŭ gravaj malhelpaĵoj li bonege ludis, dank'al siaj komercaj konoj.

A.- S-ro Decret, nia delikata muzikisto, kiu sola, preskaŭ sen rimedoj, organizis majstre teatraĵojn, literaturan kaj muzikan parton de l'kongreso kaj akompanis talente la kantantojn; oni scias ke la personoj kiuj ludis rolon venis el plej diversaj partoj de l'mondo, kio tre malsimpligis la preparadon de l'teatraj vesperoj.

Cl.- S-ro Edouard Mallet, nia kunredaktoro de Svisa Espero, malgraŭ longa foresto de Ĝenevo, okupis sin pri la ŝip-promenado de Vevey, kiu donis al la ĉeestantoj ĝuon de neforgeseblaj horoj.

A.- S-ro Marti, specialisto feliĉe trovata en tiu fako, prizorgis la reklamon en Svisujo, presigis la desegnon de S-ro Coninck por la afiŝoj kaj la poŝtkartoj.

Cl.- S-ro Hector Hodler, la ĉiutaga verkinto de l'bonaj gazetaj artikoloj kiuj aperis en niaj politikaj ĵurnaloj kaj en Esperanto-Journal, direktis sukcese la tutan gazetaran parton de l'kongreso.

A.- S-ro Emile Bernard, frato de l'prezidanto, aranĝis arte kaj lerte la ekspozicion en Bâtiment Electoral, en ĉambro kiu fariĝis oportuna kunvenejo, agrabla babilejo por la kongresanoj.

Cl.- Ni devas citi la nomon de S-ro P. Berthelot, kiu multe helpis nin por la administra parto de l'organizado, por la ĉiutaga korespondado.

A.- Preskaŭ ĉiuj ĝenevaj samideanoj alportis sian ŝtonon por konstrui la domon» diras tiu artikolo en la konkluda paragrafo. La 2-a Universala Kongreso estis ne nur la frukto de granda entuziasmo, ĝi ankaŭ estis la rezulto de granda kaj bone organizita kunlaboro.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Geaŭdantoj atentu, ekde la monato majo ŝanĝiĝos niaj elsend-horoj kaj tagoj. Niaj prelegoj aŭdiĝos jaŭde kaj sabate, kaj tiuj de d-ro Arthur Baur lunde kaj jaŭde. Elsendhoroj 19-a kaj 23-a horoj. Parolis gesinjoroj Claude kaj André Gacond. Ĝis reaŭdo!